

Laste

En aprilo la ekskurso estis al la romia ŝoseo inter Somaconcha kaj Pie de Concha kaj ni povis vidi la spektindan novan ponton de la aŭtovojo al Kastiljo (ĝi estos la plej alta en nia lando).

En majo ni piediris parton de la Kastilja Kanalo kaj vizitis kelkajn el ĝiaj konstruaĵoj. Poste ni tagmanĝis en urbeto Padilla de Arriba.

La junia ekskurso estis al la kantabra montaro.

KUNVENO

Ni rimarkas la okazigon en nia regiono de verkista kunveno okaze de Pasko. Bedaŭrinde, densa programo, krom festotagoj, malebligis okazigo de kunsido kun niaj asocioj. Ja, ni esperas ke onte ankaŭ ripetos ilian ĉeeston kaj ni povu ĝui ilian fluan lingvon tiel ki ni plibonigu kaj praktiku Esperanton. Nur por montri la gravecon de tiu renkontiĝo, jen la nomoj de tiuj: Jorge Camacho, Abel Montagut, Miguel Fernández, Antonio Valén, Joxemari Sarasua, Riita Hämäläinen kaj Liven Dek (pseŭdonimo).

REVUOJ

Krom tiuj revuoj kiujn la Asocio abonas, ni ricevas informajn bultenojn de aliaj frataj organizoj agantaj por esperanto. Speciale en la nunaj

malfacilaj cirkonstancoj por nia amiko Salvador Aragay (kun varmajn salutojn, ni esprimas nian deziron pri kontentiga solvo por liaj problemoj), ni rimarkas la daŭran kaj konstantan ricevon de la bulteno de Barcelona Esperanto-Centro. Krome, ankaŭ ni kvitancas tiujn de Bilbao, Madrid kaj Valladolid.

LOTERÍA DE NAVIDAD

Todos los años nuestra Asociación pone a disposición de los asociados participaciones de la Lotería Nacional. Recuerda que con tu colaboración contribuyes a una mejor financiación de nuestra (también la tuya) Asociación. El número elegido para este año es el:

0 5 0 5 7

LIBRO-TAGO

El próximo día 14 de diciembre celebraremos el Día del Libro en Esperanto. Habría que decir que sería más correcto celebrar este día el 21 de julio, fecha en la que conmemoramos la aparición del Primer Libro sobre el Esperanto en el año 1887. No obstante, en esta fecha, exactamente el 15 de diciembre de 1859, nació el Dr. Zamenhof, iniciador del Esperanto. Y, por lo general, resulta una fecha más adecuada para la celebración.

Aún no está decidido el programa especial, que celebraremos en nuestra sede, en calle San Fernando, 58, para

destacar la utilidad del Esperanto y el valor de los libros.

Finalizaremos, con la tradicional Cena para *socios* de nuestra Asociación. Urge que los socios que piensen asistir lo comuniquen a la mayor brevedad para poder efectuar la necesaria reserva, antes del día **16 de noviembre**.

UNIVERSALA KONGRESO

Pasinta somero okazis la Universala Kongreso en japana urbo Jokohama. Venonta jaro tiu kongreso, koincide kun la celebrado de la centjareco de Universala Esperanto-Asocio, okazos en nederlanda urbo Roterdamo. Ĉu la kantabraj geesperantistoj profitos la ŝancon ke nun eblas flugi rekte de Santander ĝis Amsterdamo? Tiuj kiuj deziras kaj/aŭ planas partopreni bonvolu kontakti nian prezidanton (S-ro Miguel Gutiérrez) kiu volonte klarigos viajn dubojn.

Se oni volas ke Esperanto pluvivu en bonfarto kun multaj esperantistoj, oni devas lerni de la junularo. La UK ne plu estu ludilo por esperantistoj, sed grava okazo por prezenti Esperanton, serioze kaj profesie, al la ekstera publiko.

Francesco Maurelli en *Esperanto*, oktobro 2007, paĝo 200.

67ª Hispana Kongreso

Ĝi okazos venontjare, de la 3-a ĝis la 6-a de julio, en Cuenca. Pri ĝi informas: alejandro.pareja@gmail.com

RECUERDA:

El primer viernes de cada mes, salvo en los períodos de vacaciones, nos reunimos en el local de la Asociación y después vamos a cenar al lugar seleccionado por consenso entre los presentes.

Asimismo, todas las excursiones, salvo que otra cosa se indique en la convocatoria, salen a las 8:30 horas, **el tercer sábado de cada mes**, desde el Monumento a la Vaca, en el Parque del Dr. Morales, frente a la empresa Teka. Consultas: ☎ 676 - 27 50 60.

VIZITOJ

Aparte menciinda estis la agrabla vizito de germana profesorino pri la hispana lingvo kaj esperantistino, Martina Braß, koincide kun la monata komuna vespermanĝo en majo. Ŝi profitis interŝanĝon kun Mezlernejo el Torrelavega por kontakti nin. Sube, ŝi kun membroj de KEA dum kunveno en nia sidejo.



Platero kaj mi

4-a ĉapitro:

LA EKLIPSO

Ni enpoŝigis la manojn nevole, kaj niaj fruntoj sentis la facilan flirton de friska ombro, same kiel ĉe la alveno en densa pinaro. Unu post la alia, la kokinoj kolektiĝis sur la ŝirmita sid-stango. Ĉirkaŭe, la verdo de la kamparo malheliĝis, kvazaŭ kovrita per la viola vualo de la ĉefaltaro. La fora maro vidiĝis blanka, kaj puraj steloj brilis pale. Kiel nuanciĝis la blanko de la terasoj! Sur ili, ni, etaj kaj ombraj en la relativa silento de la eklipso, diskriis unu al la alia pli malpli spritajn dirojn.



PLATERO Y YO

Ĉio taŭgis por rigardi la sunon: teatro-binoklo, lorno, botelo, fumumita vitro; kaj ĉiu loko estis oportuna: la verando, la krala ŝtuparo, la fenestro de la grenejo, kaj trans la bluaj kaj skarlataj vitroj de la korta pordo...



La suno, kiu momenton antaŭe faris ĉion du-, tri-, cent-oble pli granda kaj bona per sia ora kaj luma bunto, kaŝiĝis nun sen la longa transiro de la krepusko kaj lasis ĉion soleca kaj povra, kvazaŭ ĝi estus ŝanĝinta unue oron por arĝento, kaj poste tiun por kupro. La vilaĝo similis al groŝo, rusta kaj jam senvalora. Kiel etaj kaj tristaj aspektis la stratoj, la placoj, la turo, la padoj de la holmoj!

Juan Ramón Jiménez

Esperantigis: Miguel Gutiérrez Adúriz

NdR.— Con motivo del último Congreso Español de Esperanto se anunció profusamente, incluso en la prensa local, primero que se iba a presentar y, luego, que se había presentado la traducción completa de la obra *Platero y yo*, del Premio Nobel Juan Ramón Jiménez. La complejidad del libro hace, sin embargo, que la traducción sólo pueda ser llevada a cabo con éxito por persona con experiencia y dominio del esperanto, de la obra y del arte de la traducción. Sin embargo, frecuentemente, encontramos que se anuncian traducciones que obvian alguna o todas las condiciones enunciadas, lo que irremisiblemente lleva a su fiasco.



Numero 13

Oktobero 2007

Nova lerneja jaro

Kvankam pro fiskaj kialoj societoj adaptas siajn buĝetojn kaj programojn al la kalendara jaro, tamen ili funkcias ofte laŭ alia kalendaro: tiu de lernejoj. Nu, laŭ tio, ni ree komencas alian epokon, estas la lernojaroj 2007-2008.

La Asocio jam realigis kelkajn el kutimaj agadoj: vendredaj kunvenoj, komuna monata vespermanĝo kaj ekskurso jam okazis: tiu ĉi foje pere de aŭta vizito al kelkaj strandoj el la okcidenta Kantabrio, de Tagle ĝis Prellezo kaj marborda posttagmeza piedirado proksime de San Vicente de la Barquera.

Iom post iom la Estraro klopodos plenumi kaj reaktivigi laŭ la ideoj esprimitaj en la antaŭa *Saluton* kiel parto de nunjara programaro.

Tiel, jam estas je via dispono la Kristnaska Loto kaj ankaŭ jam planas la ĉi jaran vespermanĝon omaĝe al D-ro Zamenhof. Pri ambaŭ vi trovos pli longan informon.

Aliflanke, la Biblioteko havas novan aspekton, pere la akiritaj ŝrankoj; la komputilo enhavas riĉan kolekton —ni esperas aldoni post ne longe ekzemplerojn de diversaj revuoj; kursoj kaj administrataj taskoj ankaŭ ekfunkcias kaj ni esperas plibonigi rilatojn kun oficialaj instancoj. Do, ree, kunlaboru kaj aktivu!

ASOCIACIÓN CÁNTABRA DE ESPERANTO

Banka konto ĉe CAJA CANTABRIA: 2066 - 0050 - 89 - 0900046108

✉ Apartado de Correos 2.240. 39080 SANTANDER (Cantabria)

☎ 676 - 27 50 60 NIF: G39077201 Cuota Anual: 10 €